74

**Correspondants Ouvriers Internationaux** **Franca PEK-Centro**

premier étage - 27 - rue Albouy - X - Paris ~~27 - strato Albŭi' - 10-a distrikto - Pari'~~

~~telefono BOTzaris 22 48~~ 266, Rue du Fbg. St. Antoine Paris 12e

Paris, 21/1-38

Au camarade Commandant du Service des Cadre

Cher camarade,

Ci-jointe copie de ma réponse envoyée à la camarade secretaire du C.C. de l'Internationale des Espérantiste Prolétariens (I.P.E.)

Cette camarade ayant écrit une lettre à mon sujet, ou mon honneur d'ancien volontaire de la liberté est mis en cause, je vous prie de bienvouloir prendre connaissance de ma justification.

La lettre du 9/VIII 37, dont il est question dans la présente copie, je l'avais adressée au nom du camarade Roman, resp. du Serv. des Cadres, S-ion Balkanique.

Recevez, cher camarade mes meilleurs salutations.

Kurtz Berl
ancien secrétaire et délégué politique du Service des Effectifs des B.I.

Mon adresse
Kurtz B.
4, Rue Bellot, 4
Paris 19e

Arrivé le 31 ENE 1938
Expedié le
Note N.° 1308

Baruch

**P**ROLETA **E**SPERANTO - **K**ORESPONDANTO

Comm. polit. Trav. Lawer

18AGO. 12 ½

18AGO. 16.

18 AGOS. 1937

75

Paris 9/VIII-37

31300

Au camarade Commandant
de la Base des B. I.
Albacete

Cher camarade !

Sur demande du camarade secrétaire de la section française de l'Internationale Prolétarienne des Espérantistes (I. P. E.) une permission de 15 jours me fut accordée, pour assister au Congrès, de cette Internationale, qui a lieu à Paris, entre le 7 et le 12 août.

J'ai quitté mon service (Serv. des Effectifs) avec la ferme conviction d'y retourner, dès le Congrès terminé.

Mais nous (les camarades, qui ont demandés la permission pour moi, les camarades, qui m'ont accordés cette permission, ainsi que moi même) nous n'avons pas suffisamment pensés au coté sentimental de l'affaire ; au fait, que j'ai une compagne à Paris.

Ma camarade, qui est malade - elle a perdu 5 kilos pendant mon absence -, s'oppose à mon retour en Espagne.

29

Moi, qui sent le devoir d'y retourner, je suis d'avis, qu'un révolutionnaire n'a pas le

droit de mettre, quoi que ce soit, au dessus de son dévoir de révolutionnaire.
Mais ~~l~~ ayant ~~fai~~ accompli ce dévoir, je suis parti pour l'Espagne, sans que ma femme le sache. je suis aussi d'avis, qu'un communiste, devant être un homme dans le sens le plus noble du mot, a le devoir de tenir compte aussi des sentiments humains de sa compagne de vie.

En conséquence, je demande, si possible ma libération provisoire des B. I.

Je déclare d'être prêt à répondre toujours „présent" à votre appell et de me soumettre avec discipline à votre décision.

J'attends votre réponse, le plus rapidement possible.
Récevez, cher camarade Commandant, mes sentiments antifascistes.

Respectueusement votre

Kurz Berl

Ecrire à:
Landa, 1bis, Pass. Goix, Paris 19ème

P.S. Je transmets une lettre du même contenu au cam. Roman du Serv. des Cadres, (Section Balkanique.)

76

Parizo,la 19a de januaro 1938

Al kamaradino G.M. KEABLE
Sekretariino de IPE-Centro

Kara kamaradino,

Mi hodiaŭ ricevis vian leteron de la 3.1.38- Mi neesprimeble ege bedaŭras,ke vi tiel malfrue skribis al mi. Vi faras al mi riproĉon pri mia eraro. Sed vi ankaŭ faris gravajn erarojn. Vi trovos senkulpigojn por viaj eraroj. Kaj mi trovas gravan senkulpigon kaj klarigojn por mia eraro.

Viaj eraroj? Vi publikigis noton kontraŭ mi en "Informilo",antaŭ sin informi ĉe mi. Vi skribis leteron al la Komandanto de mia Bataliono(kiu cetere ne ekzistas,ĉar mi ne apartenis al neniu Bataliono) malfavoran pri mi k vi skribis al k-do Hans Martens pri mi . Tio ĉio antaŭ sin informi ĉe la interesato. Kutime,antaŭ ol kondamni iun necesas lin juĝi k por lin juĝi necesas lin aŭskulti. Vi do agis kontraŭ ĉiu jura principo,valora ankaŭ por k praktikata en ĉiu laborista organizo. Dum mia eraro koncernas nur min,ĉar en la momento, kiam mi faris ĝin,cetere ne mi sola kulpas,mi ne havis respondecan postenon en neniu organizo, via eraro estas en tiu senco pli grava, ĉar vi agas je nomo de organizo kiu nombras kelkajn milojn da membroj k tiu eraro povas malfavore efiki al la tuta organizo. Do vi venontfoje ,en la intereso de la organizo kiun vi reprezentas,devos plibone pripensi antaŭ ol agi. Ĉar vi jam faris publikigon,ĉar vi jam skribis al respondeca kamarado de la I.B.,mi ankaŭ sendos kopion de tiu letero al la koncernaj,respondecaj k-doj de la I.B. k al k-do H.Martens.

Por doni al vi klarigon pri mia ne retroveturo al Hispanio,mi ĉi-subetre detale al vi komunikas kiel k kial mi veturis Hispanion,kiel k kial mi ne retroveturis.

a) Komence de februaro 1937,mi finkonvinkiĝis pri la devo de ĉiu kiu sin diras revoluciulo,de ĉiu kiu sin diras komunisto k precipe la devo por ĉiu valida,batalkapabla membro de la Komunista Partio,veturi Hispanion. Tiam mi ne atendis nenies oficialan aŭ neoficialan ordonon. Mi iris al la kamaradino,kiu tiatempe respondecis por la rumanlingva Grupo ĉe la franca K.P. k diris: Mi deziras,komence de marto veturi Hispanion,por partopreni la batalon en la I.B.- Kial komence de marto? Ĉar mi estis etkomercisto k mi intencis intertempe likvidi mian varan havaĵeton. Kiam mi legis,ke la franca registaro fermos la landlimon ekde la 20an de februaro,mi deklaris min preta tuj forveturi. Mi do la 19an de februaro,kun la lasta leĝa transporto,forlasis Parizon. Mi la tagon de mia forveturo elspezis 300 frankojn por vestaĵo,mi ne likvidis mian varan havaĵeton k mia edzino nenion sciis pri la forlaso de mia hejmo.

b) La 30an de julio 1937,mi revenis hejmen. Mi estis ricevinta 15 tagan libertempon, krom la vojaĝdaŭro. Mi trovis mian edzinon ege malfortigita. Ŝi perdis kvin kilogramojn dum mia foresto. Ŝi tuj deklaris al mi, ke ŝi ne deziras ke mi retroveturu, ĉar tio signifus por ŝi malrapida sed certa finmurdigo. Mi la postan semajnon, do

...
antaŭ la kongreskomenciĝo min prezentis ĉe la kvartala kompartia ĉelo, deklaris al la ĉeestantaj wwwgw ge-kamaradoj ke mi ricevis permeson por ĉeesti IPE-Kongreson kaj informis la k-don, kiu respondecis por la distrikto, pri la deziro de mia edzino. Li diris al mi ke pri tio certe nur respondeca k-do de la regiona Komitato povas decidi. En mia ĉelo mi petis liston por kolekti monon por aĉeti cigaredojn, sapon, k.a. necesaĵoj por la kamaradoj el la ofico al kiu mi estis apartenanta. Estas sur tiu listo ke mi kolektis la monon en k ekster la Kongreso.

c) Alvenante al la Kongresejo mi tuj informis k-don Boubou k poste ankaŭ k-inon Boubou pri la malagrablaĵo kiun kaŭzis al mi mia reveno k mi diris al ili ke mi bedaŭras esti ricevinta la forveturpermeson. Mi informis k-don Boubou ankaŭ pri tio ke mi ne ĉeestos dum la tuta Kongreso ĉar mi intencas forveturi el Parizo kun mia edzino por ripozi dum kelkaj tagoj. Kompreneble mi tiam ankoraŭ ne estis certa ke mi ne retroveturos. Mi esperis sukcesi ŝanĝigi la opinion de mia edzino.

d),Por la mono kolektita mi aĉetis ĉiujn necesaĵojn k alportis la pakaĵojn al la Internacia Help-Komitato. Atestilon pri tio mi alportis al la Kongreso k lasis ĝin sur la Kongrestablo. Mi posedas kopion. Mi petis k-don Boubou verki apartan akompanileteron. Mi bedaŭras ke vi ne priatentis tion k en S.P. anoncis "K-do kunportis sapon k cigaredojn".

e) La 9-an de Aŭgusto 1937 mi skribis registritan leteron al la k-do Komandanto de la Bazo de la I.B. kaj al la politika respondeculo por la k-doj el la Balkanlandoj en Albacete. Per tiu letero mi klarigis la kialon pro kiu mi ne povas tuj retroveturi k petis elliberigilon.

f) La 30-an de Aŭgusto mi renkontis la k-inon kiu respondecis por la rumanlingva Grupo ĉe la Franca K.P. Ŝi diris al mi : "Mi ricevis leteron pri via demando. La k-doj koleras pri vi. Se vi dum 24 horoj ne retroveturos vi estos konsiderata kiel dizertulo. Donu al mi morgaŭ matene, per telefono, vian respondon." Mi tion promesis al ŝi. Hejmenvenante, mi trovis mian edzinon en la lito. Okazis al ŝi akcidento. Ŝia piedo estis ege vundigita per aŭtomobilo. La postan tagon mi telefonis al la k-ino, dirante, ke mi tuj ne povas retroveturi, ĉar mi ne povas lasi mian malsanan edzinon sola en la loĝejo. - Ni ne havas neniun familianon en Parizo -.
Mi volas aldoni ke tiu k-ino,pro ŝia eraro miarilate ne plu okupas la respondecas posteno.

g) La vesperon de la sama tago okazis interĉela kunveno. Mi al k-doj rakontis pri mia zorgo pro ne povo retroveturi Hispanion. K-do,ankaŭ estante reveninte el Hispanio,diris al mi : "Iru al k-do S., respondeculo pri Hispana afero ĉe la regiona komitato de la K.P. vi informiĝos pri la vidpunkto de la Partio. La 3-an de Septembro 37 mi iris al la sidejo de la regiona Komitato. Mi rakontis ĉion al k-do S. , ankaŭ pri la minaco flanke de la rumana k-ino. Jen kion li respondis al mi : "Estu tute trankvila, vi nenion

78

....

4/ Mi, estante Kompartiano komprenas "ke tian konduton mi devas absolute malaprobi" sed kondamni oni ne rajtas antaŭ la decido de la koncerna Partia instanco. Ĉu vi estas anino de la Kompartio? Mi bedaŭras, ke vi ne komprenis tion!

5/ Pri via letero al la Komandanto k al k-do Martens vidu la enkondukon.

6/ Pri la "forkuro". Ĉe kunveno de estintaj volontuloj, kiu okazis dum Novembro en Parizo, la estinta Komandanto de la Bazo de I.B. (Pariza urbkonsilanto, kompartiano) deklaris, ke eĉ tiuj k-doj, kiuj efektive forkuris el la armeo oni ne kondamnu, se ili dumtempe, per ilia ago pruvis ke ili daŭrigas esti antifaŝistoj.

7/ Mia edzino ne estas anino de la Kompartio. Mi do ne povas pli klarigi al ŝi ol mi jam tion faris.

8/ K-do Berlo estas ĉiam la samo. Li parolis sincere ĉe la Kongreso k ~~xx~~ trompis neniun.

9/ Se vi konsideras nepre necese eksigi min el IPE, faru tion, sed pripensu bone antaŭ ol fari alian eraron. Cetere vi ne rajtas eksigi min sen aprobo aŭ kontraŭ malaprobo de la Pariza IPE-anaro k de Franca IPE-Sekcio.

10/ Kiel vi vidas el la supraj deklaroj, ĉiuj respondecaj k-doj de mia Partio estis la unuaj k plej bonaj informitoj pri mia forlaso de la I.B. K-don Boubou mi persone informis komence de Oktobro kiam mi estis en Orléans.

Ĉion supre diritan vi povas kontroli ĉu pere de k-do Boubou, ĉu per rekta letero al Franca K.P., Pariza Regiono, 11, Boulevard Montmartre.(

Kun la aserto ke mi ĉiam daŭros agi en la spirito de IPE k de sincera revoluciulo mi salutas vin.

Frate via.